Ière Année, N° 5.
Janvier 1903.

Ia Jaro, 5a Numero.
Januaro 1903.

Ie Jaar, Nr 5.
Januari 1903.

GAZETO ESPERANTISTA ELIRANTA ĈIUMONATE EN BELGUJO.



LA BELGA SONORILO

JOURNAL ESPÉRANTISTE BELGE MENSUEL.

BELGISCH ESPERANTISCH MAANDSCHRIFT.

PRIX DE L'ABONNEMENT ANNUEL :	KOSTO DE LA JARA ABONO :	JAARLIJKSCHE INSCHRIJVINGSPRIJS :
2.50 fr. pour la Belgique ; 3.00 fr. pour l'étranger. 5.00 fr. (minimum) : abonnement de protecteur.	2.50 fr. en Belgujo ; 3.00 fr. en eksterbelgaj landoj. 5.00 fr. (almenaŭ) : protektanta abonanto.	2.50 fr. voor België ; 3.00 fr. voor den vreemde. 5.00 fr. (ten minste) : inschrijving als beschermer.
Un numéro (*huit pages*) **0.25 fr.**	**Unu numero** (ok paĝoj) **0.25 fr.**	**Het nummer** (*8 bladz.*) **0.25 fr.**

Ĉefredaktoro — Rédacteur en chef — Hoofdopsteller : Jos. JAMIN, 55, rue des Drapiers, Bruxelles.
Cenzuristoj — Censeurs — Keurders : E. et L. BLANJEAN, 14, rue de Wautier, Laeken.
Abonoj — Abonnements — Inschrijvingen : M. SEYNAEVE, 3, rue de l'Avenir, Courtrai.
Presisto — Imprimeur — Drukker : A.-J. WITTERYCK-DELPLACE, 4, Nouvelle Promenade, Bruges.

Avizo grava. — La abonantoj rusaj povas sendi la koston de sia abono per papermono (unu rublo). Poŝtmarkoj de ĉiuj landoj estos akceptitaj nur po du trionoj (2/3) de la valoro.

La personoj, kiuj sendos al ni almenaŭ sumon da kvin frankoj, estos enskribitaj kiel protektantaj abonantoj kaj ilia nomo estos presita en ia proksima numero.
Nia ĵurnala jaro komenciĝas la 15an de Septembro. Se oni abonas post tiu-ĉi dato, oni ricevas la jam elirintajn numerojn.

Les personnes qui nous enverront au moins la somme de cinq francs seront inscrites comme abonnés protecteurs et leur nom paraîtra dans un prochain numéro.
L'année de notre Journal commence le 15 Septembre. Si l'on s'abonne après cette date, on reçoit les numéros déjà parus.

De personen die ons ten minste de som van vijf franken toezenden zullen opgeteekend worden als inschrijvers-beschermers en hun naam zal in een aanstaande nummer gedrukt worden.
De jaargang van ons Blad begint met 15n September. Indien men zich na dien datum laat inschrijven, ontvangt men de reeds verschenen nummers.

ENHAVO.

SOMMAIRE.

INHOUD.

A.-J. WITTERYCK-DELPLACE,

IMPRIMEUR-ÉDITEUR
BRUGES, NOUVELLE PROMENADE, 4.

DRUKKER-UITGEVER
BRUGGE, NIEUWE WANDELING, 4.

Principaux Manuels en langue française.

Grammaire et exercices de la langue Internationale Esperanto par L. de Beaufront. — Prix 1.50 frc (port en plus.)
L'Esperanto en 10 leçons par Th. Cart et M. Pagnier. — Prix 0.75 (port en plus.)
Dictionnaire Esperanto-Français par L. de Beaufront. — Prix 1,50 (port en plus) en vente : aux dépôts de la Maison Hachette et Cie.

Petit Vocabulaire Français-Esperanto par Th. Cart et autres (*ouvrage provisoire en attendant le Dictionnaire Français-Esperanto*) au Secrétariat du groupe Espérantiste de Paris, 10, place de la Bourse, Paris (2a) et chez Spineux et Cie à Bruxelles. — Prix 0.75 (port en plus.)

Bij den schrijver te Hilversum (Holland) — **Volledig Leerboek der opkomende wereldtaal Esperanto**, door Dreves Uitterdijck, Trompschool, Hilversum. — Prijs : fl : 1.50 (3.75 fr.) verzendingskosten daarboven.

Bij den drukker van *La Belga Sonorilo*, Nieuwe Wandeling, 4, Brugge : **Het Esperanto in tien lessen**, aan fr. 0,50.

JOURNAUX ESPÉRANTISTES — ESPERANTISCHE BLADEN.

Lingvo Internacia fr. 4.00 par an (*4.00 fr. 's jaars*) Mr Paul de Lengyel à Szegzârd, Hongrie.
L'Espérantiste fr. 5.00 par an comprenant l'inscription comme membre de la S. p. p. E. (*5.00 fr. 's jaars recht gevende tot de inschrijving als lid van de S. p. p. E.*) Mr Edouard Bréon, Secrétaire de la S. p. p. E. 6, rue du Levant, à Vincennes, près Paris.
Societo por Internaciaj Rilatoj (S. I. R.) fr. 3.00 par an (*3.00 fr. 's jaars*) avec l'organe de la Société (*met het orgaan der Maatschappij*) « **Lingvo Internacia** » fr. 6.00 par an (*6.00 fr. 's jaars*) Mr Paul Fruictier, 27, boulevard Arago, Paris.
La Lumo fr. 3.00 par an (*3.00 fr. 's jaars*) Mr A. Rembert, 79 rue St-Christophe, Montreal, Canada
La Rondiranto fr. 3.50 par an (*3.50 fr. 's jaars*) Mr G. P. Oreŝkov, Philipoplo, Bulgarie.
La Holanda Pioniro fr. 6.00 par an (*6.00 fr. 's jaars*) Mr Dreves Uitterdijk, Hilversum, Holland.
Revuo Internacia fr. 6.00 par an (*6.00 fr. 's jaars*) Mr Fr. Ŝildo, Bystrice-Hostyn-Moravie-Autriche.
Bohema Esperantisto fr. 1.50 par an (*1.50 fr. 's jaars*) » » » » »
Germana Esperantisto fr. 1.50 par an (*1.50 fr. 's jaars*) » » » » »
Ces trois derniers journaux ensemble 8 fr. par an. — *Deze drie laatste bladen te zamen 8 fr. 's jaars.*

Ière Année, N° 5.
Janvier 1903.

Ia Jaro, 5a Numero.
Januaro 1903.

Ie Jaar, Nr 5.
Januari 1903.



GAZETO ESPERANTISTA ELIRANTA ĈIUMONATE EN BELGUJO.

LA BELGA SONORILO

JOURNAL ESPÉRANTISTE BELGE MENSUEL.

BELGISCH ESPERANTISCH MAANDSCHRIFT.

PRIX DE L'ABONNEMENT ANNUEL :	KOSTO DE LA JARA ABONO :	JAARLIJKSCHE INSCHRIJVINGSPRIJS :
2.50 fr. pour la Belgique ; 3.00 fr. pour l'étranger. 5.00 fr. (minimum) : abonnement de protecteur.	2.50 fr. en Belgujo ; 3.00 fr. en eksterbelgaj landoj. 5.00 fr. (almenaŭ) : protektanta abonanto.	2.50 fr. voor België ; 3.00 fr. voor den vreemde. 5.00 fr. (ten minste) : inschrijving als beschermer.
Un numéro (*huit pages*) 0.25 fr.	**Unu numero (ok paĝoj) 0.25 fr.**	**Het nummer (*8 bladz.*) 0.25 fr.**

Ĉefredaktoro — Rédacteur en chef — Hoofdopsteller : Jos. JAMIN, 55, rue des Drapiers, Bruxelles.
Cenzuristoj — Censeurs — Keurders : E. et L. BLANJEAN, 14, rue de Wautier, Laeken.
Abonoj — Abonnements — Inschrijvingen : M. SEYNAEVE, 3, rue de l'Avenir, Courtrai.
Presisto — Imprimeur — Drukker : A.-J. WITTERYCK-DELPLACE, 4, Nouvelle Promenade, Bruges.

1903.

Saluton por la jaro 1903 ! Ĝi estu feliĉa por ĉiuj niaj samideanoj kaj ĝi alportu al ili sukceson en ilia senĉesa propagando.

En tiu momento ni ne povas preterlasi la okazon rigardi malantaŭen por ŝati la rezultaton atingitan de l'verko pri kiu ni bataladas.

La elpensinto de Esperanto, la respektegata Doktoro Zamenhof, povas kontente kaj fiere esplori la kampon trapaŝitan de l'momento, kiam al la mondo li donacis la lingvon internacian por kiu li dediĉis tiom da tempo kaj tiom da laborado ! Ni ĉiuj scias kiomajn malfacilaĵojn renkontis nia kara Majstro en la unuaj jaroj kaj ni komprenas kiom da ĝojo li nun sentas, tial ke lia verko pli kaj pli disvastiĝas. Li povu ankoraŭ longe konservi fortikan sanon kaj li ĝuos la ŝatindan plezuron vidi la sukceson por ĉiam certigitan !

1903.

Salut à l'année 1903 ! Qu'elle soit heureuse pour tous nos partisans et qu'elle leur apporte succès dans leur incessante propagande !

En ce moment, nous ne pouvons nous empêcher de jeter un regard en arrière pour nous rendre compte du résultat auquel est parvenue l'œuvre que nous défendons.

L'auteur de l'Esperanto, le vénéré Docteur Zamenhof, doit considérer avec satisfaction et fierté le chemin parcouru depuis le jour où il donna au monde la langue internationale pour laquelle il a consacré tant de temps et tant de travail ! Nous savons tous combien notre cher Maître rencontra de difficultés dans les premières années et nous comprenons la joie qu'il doit ressentir aujourd'hui que son œuvre se répand de plus en plus. Puisse-t-il conserver longtemps une santé robuste et il aura le rare bonheur de voir le succès définitivement assuré !

1903.

Heil het jaar 1903 ! Dat het voor al onze partijgangers gelukkig weze en dat het bijval brenge aan hun onvermoeibaar verspreidingswerk !

Op dit oogenblik, kunnen wij niet nalaten eenen oogslag achteruit te werpen, om rekening te houden van de uitkomst, waartoe ons verdedigingswerk gekomen is.

De uitdenker van het Esperanto, de geëerde Doktor Zamenhof, moet met voldoening en fierheid neerzien op den weg, afgelegd sedert den dag waarop hij aan de wereld de wederlandsche taal gaf, waaraan hij zooveel tijd en zooveel werk wijdde. Wij weten allen hoeveel moeilijkheden onze lieve Meester in de eerste jaren tegenkwam, en wij begrijpen de vreugde, welke hij hedendaags moet gevoelen, nu dat zijn werk zich meer en meer verspreidt. Moge hij langen tijd eene kloeke gezondheid bewaren en hij zal het zeldzaam geluk hebben, den bijval bepaaldelijk verzekerd te zien !

Pensante al la unuaj kunlaborintoj de Doktoro Zamenhof, ni sendas tutspeciale niajn bondezirojn al la nelacebla kaj eminenta propagandanto de Esperanto, Sro de Beaufront. Kiam de pli ol dek jaroj, homo ia estas dediĉinta sian tutan tempon, sian tutan agemecon por difinita afero kaj ke li grandparte ruinigis sian sanon, tiu estas inda je speciala signo de estimo, kaj el nia tuta koro ni donacas tiun al Sro de Beaufront.

Kiel esperantistoj Belgaj, ni ne povas forgesi Komandanton Lemaire kiu tiom faris por nia grava afero. Li, unu el la plej maltimemaj pioniroj de Centra Afriko, ke li ankaŭ akceptu niajn plej korajn bondezirojn! Ke la sano al li ĉiam donacu siajn favorojn kaj la sukceso kronu lian laboradon.

La Redakcio.

Niaj Internaciaj Korespondaĵoj.

En iu el niaj lastaj numeroj, ni promesis publikigi regule tekstojn skribitajn de fremdaj Esperantistoj, kaj ni komencis per fablo, verkita de So Kofman el Odessa'o. Hodiaŭ, ni petas niajn legantojn ke ili veturu kun ni al tre aminda lando: al Moravujo en Aŭstralando. Tie ekzistas tre plenvivaj esperantistaj grupoj, kaj de ĉiuj esperantistoj estas tre konataj la nomoj de la urboj Brno (Brünn) kaj Bystrice-Hostyn. Precipe en Brno estas grupo tre agema: la esperantistaro ĉiam atentigis al ĝi kun speciala plezuro ĉar ĝi, je granda parto, konsistas el personoj por ni tre interesindaj: el laboristoj. Eble, vi ne kredas tion, amiko leganto? Volu do legi la du jenajn kartojn, elĉerpitajn inter multaj similaj el la albumoj de nia amiko So Cogen, albumoj kiuj, antaŭ nelonge, estis videblaj ĉe la Ekspozicio Antverpena.

Jen kion skribas So Kajŝ el Brno:

Brno, la 25an de Marto, 1902.

Por ĉiuj dubuloj.

Mi estas laboristo; mian edukon mi ricevis en *unuklasa lernejo popola* en Ublo (Moravujo). Nesciante, krom mia lingvo Bohema, ian fremdan lingvon, mi ellernis Esperanton post dumonata lernado. Nun mi tradukas Bohemajn kantojn popolajn al Esperanto.

Kun plej kora saluto internacia,

Jan Kajŝ,
fr. Jos. tr. 102, Brno (Moravujo)

En pensant aux premiers collaborateurs du Docteur Zamenhof, nous envoyons tout particulièrement nos souhaits à l'infatigable et éminent propagandiste de l'Esperanto, M. de Beaufront. — Quand depuis plus de dix ans un homme a consacré tout son temps, toute son activité au service d'une œuvre et qu'il a même dangereusement compromis sa santé, celui-là certes mérite une marque d'estime toute spéciale et c'est celle que nous envoyons de tout cœur à M. de Beaufront.

Nous ne pouvons non plus, en qualité d'espérantistes belges, oublier le Commandant Lemaire qui fit tant pour notre grande cause. Lui, un des plus hardis pionniers de l'Afrique centrale, qu'il reçoive aussi nos meilleurs vœux! Que la santé lui continue ses faveurs et que le succès couronne son labeur!

La Rédaction.

Correspondances Internationales.

Dans un de nos derniers numéros, nous avons promis de publier régulièrement des textes provenant d'Espérantistes étrangers, et nous avons débuté par une fable écrite par Mr Kofman d'Odessa. Aujourd'hui, nous prions nos lecteurs de se transporter avec nous dans une contrée très agréable: en Moravie (Autriche). Il existe là des groupes espérantistes très vivaces, et les noms des villes de Brno (Brünn) et de Bystrice-Hostyn sont bien connus de tous les Espérantistes. A Brno principalement se trouve un groupe très actif, sur lequel les Espérantistes attirent toujours l'attention avec un plaisir tout spécial, parce qu'il est composé en majeure partie de personnes présentant pour nous un grand intérêt: ce sont des ouvriers. Vous ne nous croyez sans doute pas, ami lecteur? Veuillez donc lire les deux cartes que voici, cartes qu'entre beaucoup d'autres nous avons cueillies dans les albums d'un de nos amis, Mr Cogen; ces albums étaient visibles tout récemment à l'Exposition d'Anvers.

Voici ce qu'écrit Mr Kajŝ de Brno:

Brno, le 15 Mars 1902.

Pour tous ceux qui doutent.

Je suis un ouvrier; j'ai reçu mon éducation dans une école primaire populaire à Ublo en Moravie. Ne connaissant, en dehors de ma propre langue, le tchèque, aucune langue étrangère, je me suis assimilé l'Esperanto après deux mois d'étude. Actuellement, je traduis en Esperanto des chansons populaires de la Bohème.

Avec mon salut international le plus cordial,

Jan Kajŝ,
fr. Jos. tr. 102, Brno (Moravie).

Denkende aan de eerste medewerkers van Doktor Zamenhof, zenden wij heel in 't bijzonder onze wenschen aan den onvermoeibaren en uitstekenden verspreider van het Esperanto, M. de Beaufront. — Wanneer een man, sedert meer dan tien jaren al zijnen tijd, al zijne werkzaamheid ten dienste van een werk besteed heeft, en dat hij zelfs gevaarvol zijne gezondheid blootstelde, deze waarlijk verdient een gansch bijzonder blijk van achting, en 't is dit, welk wij van ganscher harte aan M. de Beaufront zenden.

In hoedanigheid van Belgische Esperantisten kunnen wij ook den Bevelhebber Lemaire niet vergeten, die zooveel voor onze groote zaak deed. Hij, een der stoutste wegbaanders van Midden-Afrika, dat hij ook onze beste wenschen ontvange! Dat de gezondheid hem voorts hare gunsten verleene en dat de goede uitslag zijnen arbeid bekroone!

De Opstelraad.

Onze Wederlandsche Briefwisselingen.

In een onzer laatste nummers hebben wij beloofd bijdragen, voortkomende van vreemde Esperantisten, regelmatig mede te deelen en wij hebben begonnen met eene fabel, opgesteld door den heer Kofman van Odessa.

Op heden verzoeken wij onze lezers zich met ons naar eene zeer aangename streek, naar Moravie (Oostenrijk) te verplaatsen. Daar bestaan esperantische vereenigingen vol leven, en de namen der steden Brno (Brünn) en Bystrice-Hostyn zijn door alle Esperantisten zeer wel gekend. Te Brno bijzonderlijk is er eene zeer werkzame vereeniging, op welke de Esperantisten met een bijzonder genoegen altijd de aandacht trekken, omdat zij ten grooten deele samengesteld is uit lieden die groot belang opleveren: te weten werklieden. Gij gelooft ons zeker niet, vriend lezer? Wil dus deze twee kaarten lezen, kaarten, die wij tusschen vele andere uit het album van eenen onzer vrienden, den Heer Cogen, genomen hebben: die albums waren onlangs in de Antwerpsche tentoonstelling te zien.

Ziehier wat heer Kajs uit Brno schrijft:

Brno, den 25sten Maart 1902.

Aan al dezen die twijfelen.

Ik ben een werkman; ik heb mijne opvoeding in eene lagere volksschool ontvangen, te Ublo in Moravie. Buiten mijne eigene taal, het Tcheque, geene andere vreemde taal kennende, ben ik na twee maanden toeleg het Esperanto meester geworden. Nu vertaal ik in Esperanto de Boheemsche volksliederen.

Met mijn hartelijksten wederlandschen groet,

Jan Kajs,
fr. Jos. tr. 102, Brno (Moravie).

Jen kion skribas laboristo el Bystrice-Hostyn :

Estimata Amiko,

.... Ankaŭ en Aŭstrujo estas Esperantistoj : precipe instruistoj, oficistoj kaj multaj laboristoj. En urbo Brno (Brünn) estas societo esperantista, enhavanta pli ol cent membrojn. Mi estas ankaŭ laboristo : mi lernas nur en la vespero, en tago mi estas okupata en fabriko.

Pardonu se mi ne skribas regule. Mia aĝo estas tridek-unu jaroj. Gramatikon de mia propra lingvo mi jam de longe forgesis, sed mi esperas ke mi ankaŭ lernos Esperanton. Mi salutas ĉiujn, kiuj laboras por nia kara Lingvo kaj mi tutkore ekkrias : Vivu Esperanto.

Kun respekto, Fr. Skarupa,
Bystrice-Hostyn (Moravlando).

Longaj priparoloj estus tie-ĉi nesufiĉaj. Ni admiru sole tiun belan vidaĵon : laboristoj, post premeganta fabrika laborado, lernantaj tre rapide la Lingvon Internacian kaj plilarĝigantaj la spiriton kaj la koron per internacia korespondado.

Ni aldonas ankoraŭ tre interesan leteron de S° Holub, pri strangaj Moravaj kutimoj :

« Eble vin interesos sciiĝi kelkajn kutimojn de loĝantoj de mia lando Moravujo, kiujn mi observis en mia ĉirkaŭaĵo.

La Paskan Lundon, frue matene, venas junuloj al knabinoj, « lavas » ilian vizaĝon aŭ verŝas sur ilin malvarman akvon kaj vipas ilin per « tatar ». Pro tio ili ricevas de knabinoj « pentritan ovon » aŭ almenaŭ glaseton da dolĉa brando. Junulojn la knabinoj ne « lavas » (mi imitas la esprimon el Bohema Lingvo) sed nur ilin vipas per « tatar ».

Kio estas « tatar » ? Ĝi estas tri aŭ kvar salikaj vergoj kunplektitaj laŭ la sama maniero kiel la virinoj en vilaĝoj ordinare kunplektas siajn harligojn.

« Pentrita ovo » (mi ree imitas la esprimon el Bohema lingvo) estas kuirita ovo de kokino; ĝia ŝelo estas kolorita ruĝe, aŭ flavruĝe, viole aŭ nigre, kaj kovrita per diversaj desegnoj kaj surskribaĵoj. Desegnoj kaj surskribaĵoj konsistas el blankaj strekoj (nur malofte flavaj). La surskribaĵoj parolas ordinare pri amo aŭ prezentas la baptan nomon de ia persono. En Bohema lingvo estas tiaj ovoj nomitaj « malovana vajiĉka » aŭ « kraslice »......... (tie-ĉi la aŭtoro detale priskribas la manieron laŭ kiu la virinoj « pentras » la ovojn).

La Paskan Mardon, havas la knabinoj (aŭ pli precize dirite la virinoj) la rajton vipi kaj surverŝi la knabojn kaj virojn. Mi vidis ankaŭ ke ili ŝprucigis akvon sur sin reciproke, per ŝpruciletoj. Oni ankaŭ permesas al si sur iun elverŝi sitelon plenan je malvarma akvo sed nun okazas nur malofte tiu kruda ŝerco.

Pligrandaĝaj homoj rakontis al mi ke junuloj pli frue ofte la knabinon forportis (eĉ iam la knabinon en lito kuŝantan forportis kun ŝia lito) al rivereto kaj ĵetis ŝin en akvon, kion sekvis—oni diris al mi—iam eĉ morto. Aŭ vipi la knabinon ĝis sango kiel oni pli frue faris (sed nun jam preskaŭ nenie) ne ŝajnas al mi tro ĝentila.

Voici ce qu'écrit un ouvrier de Bystrice-Hostyn :

Ami estimé,

.........En Autriche aussi il y a des Espérantistes : ce sont surtout des instituteurs, des employés et beaucoup d'ouvriers. A Brno (Brünn), il existe une société espérantiste possédant plus de cent membres. Moi aussi, je suis un ouvrier : je n'étudie que le soir, car durant la journée je suis occupé dans une fabrique.

Pardonnez-moi si je n'écris pas correctement. Je suis âgé de trente et un ans. J'ai déjà oublié depuis longtemps la grammaire de ma propre langue, mais j'espère aussi pouvoir connaître l'Esperanto. Je salue tous ceux qui travaillent pour notre chère langue et je m'écrie de tout cœur : Vive l'Esperanto.

Avec respect, Fr. Skarupa,
Bystrice-Hostyn (Moravie).

De longs commentaires seraient ici insuffisants. Contentons-nous d'admirer ce beau tableau : des ouvriers, après le déprimant labeur de la fabrique, apprenant très rapidement la Langue Internationnale et s'élargissant l'esprit et le cœur dans une correspondance internationale.

Nous ajoutons encore une lettre très intéressante de Mr Holub, écrivant d'étranges coutumes de la Moravie.

Nous laissons, à nos lecteurs le soin de traduire eux-mêmes le texte espérantiste de cette lettre.

Si quelques-uns d'entre eux veulent nous en envoyer la traduction, nous publierons la meilleure que nous recevrons.

M. SEYNAEVE.

Ziehier hetgeen een werkman uit Bystrice-Hostyn schrijft :

Geachte Vriend,

.... In Oostenrijk zijn er ook Esperantisten, het zijn bijzonderlijk onderwijzers, bedienden, en vele werklieden.

Te Brno (Brün) bestaat er eene Esperantische vereeniging, die boven de honderd leden telt. Ik ook ben een werkman ; ik studeer slechts 's avonds, want gedurende den dag werk ik in eene fabriek.

Wil mij verontschuldigen, indien ik onnauwkeurig schrijf. Ik ben een en dertig jaren oud. Sedert lang heb ik de spraakkunst mijner eigene taal vergeten, maar ik hoop ook het Esperanto te kennen. Ik groet al dezen die werken voor onze beminde taal en uit ganscher harte roep ik uit : leve het Esperanto !

Met eerbied.

Fr. Skarupa,
Bystrice-Hostyn (Moravie).

Lange uitleggingen zouden hier overbodig zijn ; vergenoegen wij ons dit schoon tafereel te bewonderen ; werklieden, na het nederdrukkend fabriekwerk, in weinigen tijd de Wederlandsche Taal leerende en hun hart en hunnen geest ontwikkelende in eene wederlandsche briefwisseling.

Wij voegen hier nog eenen zeer belangrijken brief bij, van den heer Holub, die ons de beschrijving van zeer zonderlinge gewoonten van Moravie mededeelt.

Wij laten aan onze lezers de zorg over zelven den esperantischen tekst van dien brief te vertalen.

Indien eenigen onder hen ons wel willen de vertaling er van laten geworden, wij zullen de beste die wij ontvangen mede deelen.

Vertaald door A.-J. WITTERYCK

Sed nun tiuj-ĉi kutimoj iom post iom malaperas.
Mi ne komprenas kion la kutimo signifas. Ĝi eble ion simbole prezentas, kiel ĉiuj naciaj kutimoj havas profundan simbolan signifon, kiun la popolo jam ne scias.
Volu akcepti de mi koran saluton,

J. Holub, Instruisto,
Louĉka u Nov. Jiĉina (Moravujo).

Al niaj legantoj ni lasas la ŝarĝon traduki la esperantiston tekston de tiu letero. Se kelkaj el ili volus alsendi al ni la faritan tradukon, ni publikiĝos la plej bonan, kiun ni ricevos.

Tra la Mondo Esperantista.

Se oni ekrigardas la agadon de niaj Francaj amikoj, oni vidos ke ilia bela propagando donadas fruktojn kaj ke la multnombraj grupoj, fonditaj en la grandaj urboj Francaj, pruvas ke Esperanto tie faras ĉiutage novajn kaj gravajn progresojn. La gazetoj « Le Nouvelliste » kaj « Lyon républicain » ankoraŭ alportas al ni artikolojn pri parolado de S^{oro} Bouchet en urbo Tournon' kaj fondo de nova grupo. La Franca gazetaro parolas multe pri nia kara lingvo kaj se la artikolo ne estas ĉiam tre akurata, la korektaĵo de ĝi venas en ia sekvanta numero; la redaktoroj de tiuj gazetoj iniciatas lerni Esperanton antaŭ ol paroladi pri ĝi.
Tion ne faras ĉiam la Belgaj ĵurnalistoj.
Krom la jam cititaj ĵurnaloj, La France du Nord, l'Echo du IXe arrondissement (Parizo), Le Temps, Le Petit Parisien, La Plume Sténographique, Le Réformiste, Le Journal de Roubaix, Il Vaggiatore de Turino, La Heraldo de la Rioja (Hispanlando), La Kuryer Codzienny de Varsovio, k. t. p. parolis pri Esperanto.

***

Ni ricevis du novajn librojn. La unua estas la Vortareto filatela Franca-Esperanta kun modeloj de leteroj, verkita de S^{oro} R. Lemaire, eldonita de la Grupo Esperanta de Parizo. Al ĉiuj kolektantoj tiu vortareto estos tre utila por la teknikaj specialaj vortoj kiujn ili uzadas. La alia libro estas eldonita, sub la numero 1, de la Esperanta ĵurnalo « Lingvo Internacia » kiu fondas bibliotekon. La titolo estas « Skizo kaj tabeloj por konstruo de kurioza sunhorloĝo inter polusoj kaj ekvatoro de kapitano S. Poljanskij en Ĥabarovsk (Azia Ruslando). »
Ni rekomendas precipe tiujn verkojn al tiuj el niaj amikoj, kiuj renkontos skeptikulojn aŭ mokulojn; tiuj ĉi konvinkiĝos facile pri la mirindaj rezultatoj, kiujn oni povas ricevi de la lernado de internacia lingvo.
Oni sciigas ankoraŭ al ni ke S^{oro} Haldor Midthus, lernejestro en Lyseklöster (apud Bergen) en Norvegujo, ellaboras tradukon, en sia gepatra lingvo, de la lernolibroj de S^{oroj} de Beaufront, Th. Cart. k. t. p.

A travers le monde Espérantiste.

Si on jette un regard sur l'action de nos amis français on verra que leur belle propagande porte ses fruits et que les nombreux groupes fondés dans les grandes villes de France prouvent que l'Esperanto y fait journellement de nouveaux et importants progrès. Les journaux « Le Nouvelliste » et « Lyon républicain » nous apportent encore des articles sur la conférence de M. Bouchet dans la ville de Tournon et la fondation d'un nouveau groupe. La presse française parle beaucoup de notre chère langue et si l'article n'est pas toujours très exact, sa rectification arrive dans un des numéros suivants; les rédacteurs de ces journaux prennent l'initiative d'étudier l'Esperanto avant d'en parler.
Ainsi n'agissent pas toujours les journalistes belges.
En dehors des journaux déjà cités, on trouvera dans le texte Esperanto la liste de ceux ayant parlé de l'Esperanto.

***

Nous avons reçu deux nouveaux livres. Le premier est le vocabulaire philatélique français-esperanto avec des modèles de lettres, par M. R. Lemaire, édité par le groupe Espérantiste de Paris. Ce vocabulaire sera très utile à tous les collectionneurs pour les mots techniques spéciaux dont ils usent. L'autre livre est édité, sous le n° 1, par le journal espérantiste « Lingvo Internacia » qui commence une bibliothèque. Le titre en est: Esquisse et tables pour la construction d'un curieux cadran solaire entre les pôles et l'équateur par le capitaine S. Poljansky de Habarovsk (Russie d'Asie). Nous recommandons principalement ce travail à tous ceux de nos amis qui rencontreront des sceptiques ou des moqueurs; ceux-ci se convaincront facilement des résultats étonnants qu'on peut recevoir de l'étude d'une langue internationale On nous fait savoir aussi que M. Haldor Midthus, maître d'école à Lyseklöster (près de Bergen) en Norwège, prépare une traduction, dans sa langue maternelle, des livres d'étude de MM. de Beaufront, Th. Cart, etc.

Dwars door de Esperantische wereld.

Indien men eenen oogslag werpt op de werking van onze fransche vrienden, zal men zien dat hunne schoone propaganda hare vruchten draagt, en dat de talrijke vereenigingen, in de groote steden van Frankrijk gesticht, bewijzen dat het Esperanto er dagelijks nieuwe en belangrijke vooruitstappen doet. De bladen: « Le Nouvelliste » en « Lyon républicain » brengen ons nog artikels bij over de voordracht van M. Bouchet in de stad Tournon, en de stichting eener nieuwe vereeniging. De fransche drukpers spreekt veel over onze lieve taal en indien het artikel niet altijd zeer juist is, dan komt zijne terechtstelling in een der volgende nummers; de opstellers dezer bladen nemen eerst de voorzorg het Esperanto te leeren, vooraleer ervan te spreken.
Zoo doen niet altijd de belgische dagbladschrijvers.
Buiten de reeds opgenoemde bladen, zal men in den tekst Esperanto, de lijst vinden dergenen die van het Esperanto gesproken hebben.

***

Wij hebben twee nieuwe boeken ontvangen. Het eerste is de overal gegeerde Fransche-Esperantische woordenlijst met voorbeelden van brieven, door M. R. Lemaire, uitgegeven door de Esperantische vereeniging van Parijs. Die woordenlijst zal zeer nuttig zijn aan al de verzamelaars voor de bijzondere kunstwoorden waarvan zij gebruik maken. Het ander boek is uitgegeven onder n° 1, door het Esperantisch blad « Lingvo Internacia » dat eene boekenverzameling opent. Het opschrift ervan is: Schets en tafels voor het vervaardigen van eene zonderlinge zonnewijzerplaat tusschen de polen en den evenaar, door den kapitein S. Poljansky van Habarovsk (Aziatisch Rusland). Wij bevelen bijzonderlijk dit werk aan al deze onzer vrienden aan, die twijfelaars of bespotters zullen ontmoeten; dezen zullen zich gemakkelijk overtuigen, van de wondere uitslagen, welke men van de studie eener wederlandsche taal kan bekomen. Men laat ons ook weten dat M. Haldor Midthus, schoolmeester te Lyseklöster (bij Bergen) in Noorwegen, eene vertaling in zijne moedertaal bereidt, van de leerboeken der Heeren de Beaufront, Th. Cart, enz.

***

En la Decembra numero de « Lingvo Internacia » estas sciigoj kiuj ĝojigos la multnombrajn amikojn de nia centra organo. Post provo kaj kun propaganda celo, L. I. decidis etendi al ĉiuj abonantoj ankoraŭ pli favoran abonkoston (4 frankoj por 12 monatoj) ol tiu, kiun ĝi konsentis nur ĝis nun al la novaj abonantoj. La gazeto alportas ankaŭ alian interesan sciigon : ĝi entreprenas fondi societon, kies plena funkciado povos havi grandan influon por la sukceso de nia propagando. Tiu *Societo por Internaciaj Rilatoj* (S. I. R.) celas alporti al siaj membroj diversajn profitojn riceveblajn de internaciaj komunikoj. Ĉiu membro havas la rajton presigi senpagan anoncon en L. I. kaj ricevi sciigojn de la sekretarioj. La jara kotizaĵo estas 3 frankoj (aŭ 6 fr. kun abono al L. I.). Komprenéble, organizado de tiu societo estos longa sed ni esperas ke tiu programo plene efektiviĝos : ĝi alportos al nia afero praktikan fundamenton.

***

Dum ni organizis kursojn en Bruselo kaj en Antverpeno, niaj Francaj amikoj aranĝis multe da ili en la ĉefaj urboj de Franclando. En Parizo, la Societoj sekvantaj fondis kursojn : Association polytechnique, Association philomathique, Association polymathique, Société d'Enseignement moderne, Société populaire des Beaux-Arts, Institut populaire d'Enseignement commercial, la Ĉeka Societo, k. t. p., plie ni citos la kursojn organizatajn de la Franca « Touring Club » kaj de la grupo Pariza de la S. p. p. E., ankoraŭ la kurson specialan por formi profesorojn de Esperanto, kiu estas farata de S° Th. Cart en « La Sorbonne ».

***

En la proksima numero ni parolos pri la muzikaj verkoj Esperantaj ; hodiaŭ ni povas anonci la proksiman aperon de valso titolata « Esperanto », de nia fervora propagandanto Lucien Bernot. Ni ne dubas ke tiu muzikaĵo havos similan sukceson kiel la antaŭaj verkoj de la sama aŭtoro.

***

La Societo por la propagando de Esperanto (S. p. p. E.) anoncas sian novan jarlibron (por la jaro 1903[a]) kiu estas akirebla de nun. La S. p. p. E. estas la plej grava kaj la plej multnombra Esperanta Societo el la Esperanta mondo.

Ĝia jarlibro enhavas la nomojn de ĉiuj membroj ĝiaj, kaj iliajn adresojn. Tiu libro estas necesega por tiuj, kiuj volas posedi multe da adresoj en diversaj landoj. Jos. JAMIN.

***

Le numéro de décembre de « Lingvo Internacia » contient des informations qui réjouiront les nombreux amis de notre organe central. Après un essai, et dans un but de propagande, L. I. a décidé d'étendre à tous ses abonnés un tarif encore plus avantageux (4 francs pour 12 mois) que celui qui ne fut accordé jusqu'à présent,qu'aux nouveaux abonnés. Le journal nous apporte encore une autre nouvelle intéressante : il entreprend de fonder une société dont le fonctionnement complet pourra avoir une grande influence sur le succès de notre propagande. Cette « Société pour des relations internationales » (S. I. R.) a pour but de procurer à ses membres les divers avantages qu'on peut retirer de communications internationales. Chaque membre a droit à une annonce gratuite dans L. I. et reçoit des renseignements des secrétaires. La cotisation annuelle est de 3 francs (ou 6 francs avec abonnement à L. I.)

Naturellement l'organisation de cette société sera longue mais nous espérons que ce programme se réalisera complètement : il apportera à notre cause une base pratique.

***

Pendant que nous organisions des cours à Bruxelles et à Anvers, nos amis français, de leur côté, en instituaient de nombreux dans les principales villes de leur pays. On trouvera cidessus la liste des sociétés organisatrices de cours à Paris.

***

